

Numero: 267.  
Aŭgusto: 2014.

22-a jarkolekto

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefona: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Kie estas esperantistoj?

Antaŭ nelonge mi legis interesan gazetartikolon: **Kie estas esperantistoj?** La demandanto plendas, ke el la ĉi someraj Esperanto-aranĝoj, renkontoj, eĉ kongresoj mankas la partoprenantoj. Kvazaŭ esperantistoj estus malaperintaj.

Mi ankoraŭ rememoras, antaŭ jardekoj ofte pluraj mil geesperantistoj vizitadis tiajn programojn.

En 1983 la budapeŝtan 68. UK – on partoprenis 4834 geesperantistoj el la tuta mondo. Antaŭ tio en 1978 en Varno (Bulgario) 63 – an 4414 adeptoj de Zamenhof, tiam ankoraŭ ne menciis la jubilean Universalan Kongreson en Varsovio, kie kongresis 5946 parolantoj de la Internacia Lingvo.

Ankoraŭ mi longe povus listigi „la gigantajn” kongresojn.

Ĉu la nunaj geesperantistoj ne ŝatas kongresi, samideane manpreni aŭ ĉirkaŭbrakumi sian eksterlandan amikon?

Tion mi ne kredas. Ni devas serĉi en alio ĝian kaŭzon.

Ni ne fariĝis indiferentaj, sed en la mondo okazis grandaj ŝanĝigoj politikaj kaj ekonomiaj. Multaj landoj iĝis danĝeraj pro diversaj militaj eventoj.

Krome estas sentebla la rapidega maljuniĝo de geesperantistoj. Mankas gejunuloj. Kiuj restis, tiuj ne havas monon por la vojaĝo.

Ni diru sincere, tiaj kongresoj, renkontiĝoj estas tre multekostaj por la homoj. Tiu ĉi fenomeno estas spertebla ankaŭ en Hungario. Nur malmultaj homoj povas permesi al si vojaĝi al foraj landoj. Sed ankaŭ la najbarlandaj Esperanto-renkontiĝoj multekostaj: vojaĝo, partoprenkotizo, loĝado, manĝado.

Tiaj Esperanto – aranĝoj ofte daŭras unu semajnon.

Laŭ la unusola solvo estus la senprofita renkontiĝo sen kia ajn brila lukso. La akcento devus esti je la amikeco kaj montri la utilojn de Esperanto.

-Redaktanto-



## La puto

Viro staris ĉe puto kaj fikse rigardis malsupren ĝian fundon.

La puto estis forlasite kaj ŝajnis, ke jam delonge neniu ĉerpis el ĝi akvon.

Alia viro alpaŝas lin kaj demandas:

-Kion vi rigardas en la puto? Ĉu la akvo estas trinkebla?

-Mi rigardas la fundon de la puto. Ene estas miloj da mortintaj lingvoj.

-Ĉu en ĉi puto ne estas akvo? Kia puto ĝi estas?

-Jes en ĝi ne estas akvo. Ĝi estas la tombejo de la lingvoj. Ĉiutage en ĝin estas ĵetita almenaŭ unu lingvo. Nuntempe la naciaj lingvoj rapide formortas.

-Dio mia! – li ekkriis panike. – Mi ankoraŭ ne aŭdis pri tia puto.

-Bedaŭrinde ekzistas tia puto. En iu tago ĉiu nacia lingvo ripozos tie ĉi.

-Kiel oni komunikos?

-Restos nur unusola mondlingvo kaj ĝi estos uzata.

-Sed mi ŝatas mian gepatran lingvon. Mi ne volas, ke ĝi formortu. Tiun ĉi lingvon instruis al mi mia patrino. Ĝin mi lernis ankaŭ en la lernejo.

-Kion fari? Kontraŭ tio oni povas fari nenion.

-Mi ne deziras tian estonton. Amiko, ni enterigu tiun ĉi puton!

-Ĉu enterigi ĝin?

-Jes. Vidu, en tiu domo estas ŝoveliloj! Se ni kuntenas, eĉ invitas aliajn homojn, tiun ĉi laboron ni rapide finos.

-Bonega ideo. Ni enterigu tiun ĉi puton.

-Homoj, venu por helpi al ni! Ni savu la naciajn lingvojn!

El ĉiu direkto ekiris la homoj kaj kunportis ŝovelilojn. Mute ili komencis la laboron kaj post kelkaj minutoj la puto estis enterigita, kaj sur ĝian lokon oni metis tabulon kun la sekva teksto:

„ENTERIGU ĈIUN PUTON, KIU TIAL ESTAS, KE EN ĜI LINGVOJ FORMORTU. RESTU NUR TIA, KIU ESTINGOS LA SOIFON PER FREŜA AKVO!”

-Ŝaŝa-



# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
II. – a

Post la alveno la lunanoj akceptis ilin amikeme. Johano akompanis Elizabeton ĝis la akceptejo. Antaŭ ol disiĝi, Johano promesis la junulinon, ke ili renkontiĝos baldaŭe.

La onklino Izabela jam malpacience atendis lin. La oldulino apenaŭ ŝanĝiĝis. Ŝi tute tiel aspektis, kiel li ekkonis ŝin pere de videotelefono.

-Johaĉjo! – etendis siajn brakoj la maljunulino, kiam ŝi ekvidis sian nevon. – Dank' al Dio, vi bonŝance alvenis. Ĉu vi vojaĝis agrable? Kiu estis tiu junulino kun kiu vi babilis?



Ŝi apenaŭ lasis tempon al Johano por ke li povu respondi.

-Ni konatiĝis ankoraŭ en la kosmoŝipo. Ŝi helpis pasigi la tedajn minutojn. Ankaŭ ŝi estas tie ĉi sur Luno unuafoje. Ŝi ricevis laboron en la Tera Ambasadorejo, kiel sekretariino.

La maljunulino ekridis:

-Atentu pri sekretariinoj. Ili estas danĝeraj inoj. Iam ankaŭ mi estis tio. Ho Dio mia, kiom rapidege forpasis tiuj belegaj jaroj. Nu, ni iru! Mi kuiris por vi bongustan tagmanĝon.

-Onklino, - diris Johano – mi ŝatus gustumi ankaŭ la Lunajn specialaĵojn. Ĉu eblas?

-Kial ne? Morgaŭ ni vizitos animagordan restoracion, sed hodiaŭ vi devos manĝi mian tagmanĝon. Ni rapidu, ĝuste nun ekveturas la loka transportilo al nia loĝkvartalo Venuso.

Sur Luno la publika veturilo estis tute alia, kiel la tera. Tio estis arĝenta globo. Ili eniĝis kaj en la sekva momento ili jam estis en la loĝkvartalo Venuso.



La globo estis fantasta veturilo. Johano kaj lia onklino englobiĝis almenaŭ dekope kun aliaj pasaĝeroj. Tio estis la plej interesa, ke ili ĉiuj deziris

veturi al alia loĝkvartalo. Krom ili neniu iris al tiu direkto, kiel ili.

La pasaĝeroj bone aŭdeble diris la vojaĝcelon. Se hazarde iu parolis tro mallaŭte, tiam voĉo en la globo ripetigis tion, kaj tiam ĉio estis en ordo, ili ekveturis. Por Johano tio estis la plej interesa, ke ili samtempe alvenis, kvankam, kiel mi diris, la pasaĝeroj ĉiuj loĝis diversloke. Kiel tio povis okazi ankoraŭ estis granda sekreto al Johano. Sed li timis demandi la onklinon. Tie ĉi sur Luno ŝajne estis ĉiutaga afero, kvazaŭ oni veturis per metroo en iu tera urbejo.

-Ni alvenis – pepadis kare la onklino kaj ili elpaŝis ĝuste antaŭ la enirejo de giganta domo.

Johano suprenrigardis, sed li ne vidis ĝian supron.

-Onjo! En kioma etaĝo vi loĝas?

-Ĉu mi ne skribis al vi? Mia modesta loĝejo estas en la okcent tridek sepa etaĝo.

-Ĉu ni iros perpiede? – demandis ŝerce Johano.

Je kio la maljunulino respondis gaje:

-Se vi deziras.

Johano ne kuraĝis entrepreni. Anstataŭ tio li sekvis sian onklinon, kiu gvidis lin al nova interesa aparato.

Enpaŝante la konstruaĵon ili rekte iris al stranga aparato. Ĝi estis en la mezo de la halo. Ankaŭ aliaj homoj proksimiĝis al ĝi. La onklino konis kelkajn el ili kaj bonhumore salutis ilin.

-Lunsaluton! Lunsaluton!

Ankaŭ la konatuloj salutis ilin.

Johanon tre interesis, kio estas tiu ĉi aparato kaj mallaŭte demandis:

-Kio ĝi estas, onjo?

Ŝi denove ekridetis kaj flustris al li:

-Per ĝia helpo ni iros supren al la loĝejo.

-Per ĝi? Sed kiel? – li ekmiris kaj scivole atendis kio okazos.

( daŭrigota )



# Poezio

Laŭ mi Esperanto ne povus ekzisti sen poemoj. Jam ekde la jaro, dank' al doktoro Zamenhof, belegaj originalaj kaj tradukitaj poemoj ekaperis en tiu ĉi lingvo.

Estas kiuj asertas, Esperanto estas nur artefarita lingvo, kaj ĝi ne bezonas la noblan laŭron de Parnaso.

Kiu ne konas Esperanton, tiu ne povas imagi, ke ankaŭ en tiu ĉi lingvo bele sonas la versoj. Se oni anime kaj kore deklamas kaj atentis pri la akcento, tiam baldaŭe ni ekaŭdos ĝian ĉielan muzikon.

Onidire Esperanto estas facile ellernebla, sed verki poemon en ĝi nur kelkaj talentuloj estas kapablaj.

Kompreneble, kiu sentas iom da emon briladi en Poemujo, tiu provu verki kaj sincere surpaperigi, kion diktas la koro!

-Adalberto-

Mikaelo Bronŝtejn

## Oksikoko

Ree nin post someraj vantoj  
Trankviligas la trist' aŭtuna.  
Ree en oksikokaj vangoj  
Respegulas sin oro suna.  
Estis multaj ideoj belaj  
Dum tendara diskut' aŭdaca,  
Sed la lando de verdaj steloj  
Nun solviĝis en vivo paca.


En la mond' akurata  
Ĉiu havas la lokon:  
Seĝon – la advokato,  
Tekon – la diplomato,  
Amon – ĉiu amato, –  
Havas mi oksikokon.

Revoj, revoj – vi, sapvezikoj –  
Kreve krakas en vivo kruda.  
Ofte inter la kapoj brikaj  
Cedas ni al la ver' apuda.  
Tiu fuĝis, disreviĝinta,  
Tiu mortis pro koratako,  
Tiu ion atingis pro la  
Ĉiopova "haroza brako".  
Ne al pompa jubeo  
Preĝas povra ermito.  
Jes, ni strebas al kreo,  
Sed la vica ideo  
Vane staras kun veo

Antaŭ pordo fermita.

Mi en marĉoj trankvilon serĉas, –  
Oksikoko, la amo mia, –  
Post senvenkaj bataloj, certe,  
Savos min ĝia sorĉ' magia.  
Se dum la rikoltado ŝvita  
Mi alvokon aŭ mokon aŭdas,  
Tenas min la afer' profita, –  
Ne kverelas mi, ne aplaŭdas.

Vi komprenu, amiko,  
Mi ja aŭdas la vokon,  
Sed afero komplika –  
Opinio publika,  
Kaj mi estas laika –  
Havas mi oksikokon.



Emeriko Baranyai

## La lasta vespero

Simile al bestoj ĉasataj en pelo,  
la nuboj, gravedaj de fulmoj, puŝate  
de vento siblanta, kuregis sen celo,  
rifuĝe, tumulte, tordiĝe, pluvbate.

Kaj unu al alia la manojn ni premis  
varmege, dolore, pasie, mutbuŝe,  
kaj niajn suspirojn la vent' superĝemis,  
la nuboj kurantaj frapadis nin duŝe.

De ŝtormo ekstera, de ŝtormo interna  
azilon ni serĉis en interkisiĝo,  
en buŝinterpremo, brakumo plej ferma.  
La vento veadis: disiĝo, disiĝo.

Min pelas, forpelas la lukt' por moneroj.  
Reveni, revidi, rekisi — malcerte.  
Du orfaj, malsekaj de pluvo paseroj,  
tremante de frido, ĉirpetis inerte.



# Por infanoj

## La lupu kaj la leporeto



Iam estis, iam ne, vivis leporeto en sia apudbarbara domo. Antaŭtagmeze ĝi laboris en la ĝardeno, kie ĝi pioĉadis la karotojn. Kiam la laboro estis finita, ĝi eksidis antaŭ la domo sur benkon kaj ĝi aŭskultis la pepadon de la birdoj.

En iu tago laborante en la ĝardeno subite ekaperis lupu. Ĝi malsatiĝis kaj decidis manĝi la leporeton je tagmanĝo.

Ĝi iris al la barilo de la ĝardeno kaj enkriis:

-Leporeto, prepariĝu mi manĝos vin je tagmanĝo!

-Bone, lupu amiko mia – ĝi diris trankvile – sed bonvolu permesi al mi, ke mi finu la pioĉadon!

-Orde, sed rapidu, ĉar mi estas ege malsata!

-Kompreneble mi rapidas. Se vi helpus, tiam ni pli rapide finus la laboron duope. En la ilarejo estas la pioĉo.



La ideo plaĉis al la lupu kaj ankaŭ ĝi komencis pioĉi la karoton. Ĝi laboris rapide dume la leporeto ofte ekripozis.

-Lupu, amiko mia, ekripozu, ĉar vi laciĝos!

-Ne timu min! Mi deziras baldaŭ fini ĉi laboron. Mi estas tre malsata.

En la ĝardeno estis multe da karotoplantoj, kaj la pioĉado daŭris longe.

Kiam la laboro estis finita, la lupu tiom laciĝis, ke ĝi apenaŭ staris sur siaj piedoj.

En la domo la leporeto diris al ĝi:

-Mi vidas, ke vi tre laciĝis pro la pioĉado. Dum mi boligas akvon por la kuirado, mi proponas al vi ripozi iomete en mia lito.

-Bonege – ĝojegis la lupu – sed ne forgesu vekti min, se la akvo boliĝos!

La lupu eniris la dormoĉambbron kaj enlitiĝis. La lito estis mola kaj komforta. La laca besto tuj endormiĝis. Tiom profunde ĝi dormis, ke mil kanonpafo ne povintus vekti ĝin.

Tion ĉi atendis la leporeto. Ĝi senhezite kuregis al la proksima vilaĝo, kie vivis ĝia amiko, la ĉasisto. Ĝi ekscitite rakontis pri la lupu, kiu nun dormas en ĝia lito kaj ĝi volas manĝi ĝin, la leporeton.

La ĉasisto tre ŝatis sian etan amikon, kaj li prenis la pafilon.

Enpaŝante la ĉambbron laŭte kriis al la lupu:

-Kion vi faras en la lito de mia bona amiko?

Li ŝovis la tubon de la pafilo al la nazo de la besto, kiu unue komprenis nenion. Sed ekvidante la pafilon ĝi komencis plorpetegi:

-Sinjoro ĉasisto, pardonu min! Mi nur ŝercis. Mi ne deziris manĝi la leporeton. Vidu, ja mi helpis al ĝi por pioĉi karoton en la ĝardeno.

La ĉasisto iris al la fenestro kaj li elrigardis. Tion atendis la lupu. Ĝi tiam elsaltis el la lito, kvazaŭ siaj piedoj estus el risorto, kaj forkuregis. Neniam ĝi kuraĝis reveni al la dometo de la leporeto.

-Ĝi forkuregis – ili ridegis pri la tremanta lupu.

La leporeto dankis la helpon kaj ĝi donacis belan karoton al sia savanto.

Post la foriro de la ĉasisto la leporeto sidiĝis antaŭ la domon sur la benkon kaj ĝi aŭskultis la pepadon de la birdoj.

-Onklo Adalberto-



# Arbaro

# Arbaro

